

**NSiR - Nova Sento in Rete  
N. 1055 (25/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it) ; internet  
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta [iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it) ; internet  
<http://iej.esperanto.it>

Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, [notiziario@esperanto.it](mailto:notiziario@esperanto.it)  
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

**NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR**

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

**LIBRERIA**

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

[feilibri@esperanto.it](mailto:feilibri@esperanto.it)

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,  
realizzeremo grandi progetti!

**Indice articoli**

- Gustumado de NK..... 2
- Invito por la Seminario de Literatura tradukado ĉe KCE ..... 3
- Virtuala Kongreso 1: UEA 75-jara. Kien nun? ..... 4
- Virtuala Kongreso 2 ..... 6
- Elekto-Komisiono de UEA..... 7
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus Esperanton..... 7
- Pillole di Salvezza 1056: il Muro di Berlino ..... 9

**GUSTUMADO DE NK**

Bedaŭrinde IEF devis nuligi la nacian kongreson kiu devintus okazi fine de aŭgusto 2020, ĝin enprogramigante fine de aŭgusto 2021, pro Kovid19. Tamen, por ne tute senigi la fidelajn partoprenantojn kaj ĉiujn interesatajn esperantistojn je la ĝojo partopreni al la itala kongreso, IEF decidis organizi jun .... Gustumadon ĝuste sub la nomo "Gustumado de itala nacia kongreso". Ĝi okazos ĉiutage de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 de la 17.00 ĝis la 19.00 (itala horo) pere de Zoom kaj resendo al Facebook kaj youtube.

Ni aldonas la programon kiu antaŭvidas – kiel la tradicia kongreso – prelegojn, seminariojn, iom da turismado, koncertojn, rondan tablon. Por partopreni sufiĉas sendi retmesaĝon al debora.rossetti.1611@gmail.com kaj vi ricevos la datumojn por eniri en la .... Kongresejon.

La aliĝo estas senpaga.

\*\*\*\*\*

Programo:

### **"GUSTUMADO de itala nacia kongreso"**

de dimanĉo la 23-a ĝis sabato la 29-a de aŭgusto 2020

#### ***Dimanĉe 23/08 (18.00 /20.00***

- Bonvenigaj vortoj
- Ivan Orsini: prelego pri Raffaello

#### ***· Lunde 24/08 (17.00 /19.00)***

- Duncan Charters: Komunikado: interpersona, informa, transkultura, konfliktsolva
- Renato Corsetti: Sankta Francisko kaj la lupoj: paco kaj milito en la nuna mondo

#### ***· Marde 25/08 (17.00 /19.00)***

- Premiado de literaturaj kaj kanzon-konkursoj fare de Carlo Minnaja

#### ***· Merkrede 26/08 (17.00 /19.00)***

- Antonio Matasso: vojaĝo tra la mezepoka Assisi

#### ***· Ĵaŭde 27/08: (17.00 /19.00)***

- Anna Lowenstein: seminario pri verkado (kun praktikaj ekzercoj).

· **Vendrede 28/08 (17.00 /19.00)**

- Humphrey Tonkin, Giorgio Novello, François Lo Jacomo, Sara Spanò, Cesco Reale. UN 75-jara ronda tablo

· **Sabate 29/08 (17.00 /19.00)**

- Niaj artistoj sin prezentas, zorge de Riccardo Lamperti

Ni atendas vin multnombraj.

**INVITO POR LA SEMINARIO DE LITERATURA TRADUKADO ĈE KCE – LA CHAUX-DE-FONDS AŬGUSTO 2020**

Ĉi-jare mi partoprenis en kurso pri tradukarto okazinta de la 4a ĝis la 9a de aŭgusto ĉe la Esperanta Domo en La Chaux-de-Fonds. Estis trejnkurso kaj interesa kaj amuza; fakte mi lernis multe, en malpeza maniero. La leciono pri esperanta metriko permesis al mi koni iom pli pri tradukado de poezioj kaj de kanzonoj, temo pri kiu mi neniam antaŭe alfrontis. La leciono pri historio de la tradukado pligrandigis mian konon pri la esperanta kulturo, specife pri la literaturo tradukita, kiun mi ne konis je la sama nivelo kiel tiu originala. La analizo de la kanzono elektita igis min pli atenta al prilaboro de tekstoj rilate kaj al tradukado kaj al verkado. Fine la studo de la verko "La infana raso" konsentis al mi akiri plian lertecon en la traduko ĝenerale kaj novajn konojn specife pri la traduko de verkoj el esperanto, tion kion ĝis nun mi ne spertis. Konklude mi tre ĝojis partopreni en tiu ĉi seminario, kiu reprezentas por mi gravan pason en la progresiva vojo.

Dum la tuta semajno oni organizis ankaŭ ekskursojn. Merkrede, en eta grupo, ni iris al Neuchâtel, tie ni vizitis la Muzeon de Historio kaj Arto, kaj ni promenis laŭlonge la lago. Ĵaŭde ni faris viziton kun gvidanto en La Chaux-de-Fonds kaj promenis sur la stratoj, intertempe la gvidanto klarigis al ni kelkajn aspektojn de la urbo rilate al historio de esperanto kaj ni miris belajn konstruaĵojn. Vendrede estis la okazo por vidi la Muzeon de la subtera muelilo en Le Locle: praktike subteren oni konstruis, en la XVII jarcento, muelilon sur sep etaĝoj kiu staris en grotoj kaj cirkuligis akvon, sed ĝi havis ankaŭ aliajn funkciojn (produktado de fruktoj, cerealoj, kanabo kaj lino); en tiu ĉi urbo ni eniris krome la urbodomon. Sabate ni konkludis nian vojaĝon tra la kantono, irante al Môtiers, tie ni vidis mezepokan preĝejon, ni promenis tra la urbocentro kaj atingis kvar muzeojn. La unua estis Muzeo de la absinto, kie troviĝas la historio de tiu ĉi trinkaĵo ĝis la malpermeso de uzo pro ĝiaj danĝeraj efektoj. La dua estis la Muzeo de la maskoj, kie estas Teatro, nun fermita, ĉiuokaze ni spektis dokumentarion pri la kantono kaj ni vidis kelkajn produktojn de la loka industrio.

La tria estis la Muzeo de Rousseau, kiu kolektas la objektojn koncernajn la vivon de Rousseau en tiu ĉi vilaĝo kaj la gvidantino faris etan priskribon pri ĝi. Fine mi estis kun alia samideanino en la Muzeo de la aŭstrala aborigena arto, kie estas multkoloraj artaĵoj kaj ĝi estas interesa je etnografia kaj historia vidpunkto.

Vespere ni spektis filmojn en esperanto kaj ludis societan ludon, la tielnomatan "Monopoli", en la eŭropa versio. La etoso estis tre gaja kaj plie internacia, fakte ni estis el kvar malsamaj nacioj: Italio, Francio, Germanio kaj Hispanio, do en la konversacioj, ankaŭ dum la libertempo, miksiĝis pluraj lingvoj kaj kulturoj, sekve la renkontiĝo rezultis tre kultura. Ni gustumis manĝaĵojn de la svisa, franca, itala kaj hispana kuirarto, estis tiel miksaĵo de tradicioj.

*Paola Tosato*



## VIRTUALA KONGRESO 1

### UN 75-JARA: KIEN NUN? INVITO AL PLUA DISKUTADO KAJ KUNPLANADO EN MONDAFEST' 2020

La Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) transprenis la temon de la nuligita 105-a Universala Kongreso: **"UN 75-jara: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo"**. Tiu temo spegulas la longan kunlaboran rilaton inter la Esperanto-movado (speciale UEA) kaj Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj same la signifon de tiu dialoga kaj mondo-pliboniga laboro de UN por esperantistoj.

La temo estis enkondukita kadre de la "Somera Inaŭguro" de MondaFest' 2020, la 20-an de junio ([youtu.be/SCMdxEIu128](https://youtu.be/SCMdxEIu128)), i.a. per mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de UN, António Guterres (00:49:00), prezento de Humphrey Tonkin (00:50:25) kaj saluta mesaĝo direktita al MondaFest' de la Speciala Konsilisto Fabrizio Hochschild, respondeculo pri la 75-jara datreveno de UN (1:11:45). Ekde la inaŭguro de MondaFest' ĝis la malfermo de la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 1-an de aŭgusto, okazis pluraj laborkunsidoj por la temo kaj pluraj agadoj al ĝi rilataj, kiel intervenoj kaj prelegoj en NASK, Usona Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso kaj diskutado en la Facebook-grupo UN75 en Esperanto!, ĉio oficiale kadre de MondaFest' 2020. Aparte dum la VK estis riĉa diskutado pri la temo dum la tagoj 1-a kaj 8-a de aŭgusto. Legu resumon pri tio pli sube.

Nun la kunordiga teamo pri la temo (Humphrey Tonkin, Sara Spanò, Rakoen Maertens, Mark Fettes, Fernando Maia Jr., Renato Corsetti, Jon Liechty, Gadirou Diallo kaj Raúl García) esperas atingi ankoraŭ iom pli,. Tial UEA invitas ĉiujn partopreni en jenaj venontaj virtualaj kunvenoj, sub gvido de la eks-prezidanto de UEA Mark Fettes:

2020-08-17, 15:00 UTC: **La Celoj por Daŭripova Evoluigo, grupo 1 – la socia bazo**: forigi malriĉecon, redukti socian/internacian malegalecon, disvastigi sanon, edukadon, seksan egalecon, pacon kaj aliron al justico. [eventaservo.org/e/CDE-grupo1](https://eventaservo.org/e/CDE-grupo1) - Aliĝu ĉe: [sfu.zoom.us/j/98499826073?pwd=Y05ybWExOFZCVFI1Skw1RGIJVDFQdz09](https://sfu.zoom.us/j/98499826073?pwd=Y05ybWExOFZCVFI1Skw1RGIJVDFQdz09)

2020-08-22, 17:00 UTC: **La Celoj por Daŭripova Evoluigo, grupo 2 – socia infrastrukturo**: mastrumi daŭripovan provizon de akvo, manĝaĵoj, energio, loĝejoj, laboro kaj disvolvi daŭripovajn alirojn al produktado, konsumado, industrio kaj inventemo. [eventaservo.org/e/CDE-grupo2](https://eventaservo.org/e/CDE-grupo2) - Aliĝu ĉe: [sfu.zoom.us/j/94536246025?pwd=NzFYZlhlJm8wLzhDM1IGSkpQR2tidz09](https://sfu.zoom.us/j/94536246025?pwd=NzFYZlhlJm8wLzhDM1IGSkpQR2tidz09)

2020-08-31, 16:00 UTC: **La Celoj por Daŭripova Evoluigo, grupo 3 – protekti la naturon**: kontraŭbatali klimatŝanĝiĝon kaj daŭripove mastrumi la marojn kaj terojn. [eventaservo.org/e/CDE-grupo3](https://eventaservo.org/e/CDE-grupo3) - Aliĝu ĉe: [sfu.zoom.us/j/91269820663?pwd=RDI3MxRHL1BaNnVUTIZwK2NMNzh1UT09](https://sfu.zoom.us/j/91269820663?pwd=RDI3MxRHL1BaNnVUTIZwK2NMNzh1UT09)

La celo de tiuj kunvenoj estas kolekti kaj profundigi ideojn por la raporto kaj rezolucio de UEA al UN, kaj krei la bazon de plano por pli konstanta kaj vasta engaĝiĝo de esperantistoj kun la laboro de UN. Kvankam la deirpunkto estas la Celoj por Daŭripova Evoluigo, la laborgrupo estas malfermita al ĉiuspecaj ideoj, kiuj iel tuŝas la agadojn kaj prioritatojn de UN kaj utiligas la specifajn fortojn kaj kapablojn de la Esperanto-movado aŭ celas ĝian plifortigon kaj plikapabligon.

Se vi ne povas partopreni en tiuj kunsidoj, vi estas bonvena kontribui ĝis la fino de aŭgusto per ideoj ankaŭ retmesaĝe al la kunordigantoj Mark Fettes ([mtfettes@sfu.ca](mailto:mtfettes@sfu.ca)), Humphrey Tonkin ([tonkin@hartford.edu](mailto:tonkin@hartford.edu)) kaj Rakoen Maertens ([rakoem@maertens.international](mailto:rakoem@maertens.international)).

Bonvolu helpi disvastigi ĉi tiun inviton inter viaj rondoj kaj kontaktoj, kiuj interesiĝas pri UN aŭ pri iu aspekto de tiu ĉi ampleksa temaro.

### **Aktualiĝu pri la temo "UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝanta mondo":**

Sub la redakta gvido de Humphrey Tonkin kaj Rakoen Maertens aperis la *Gvidilo al la 17 celoj por daŭripova evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj*, en reta formo ĉe [esperantoporun.org/dokumentoj/gvidilo-17-celoj-por-dauripova-evoluigo-de-un/](http://esperantoporun.org/dokumentoj/gvidilo-17-celoj-por-dauripova-evoluigo-de-un/), kaj ankaŭ papere ĉe la eldonejo Mondial. Dek sep diversaj fakuloj kontribuis mallongajn eseojn pri la 17 celoj, i.a. pri tio, kion esperantistoj mem povas fari por pli bone ekkoni la Celojn kaj kontribui al ilia realigo.

Krom tio, kadre de la Virtuala Kongreso, indas (re)spekti almenaŭ la jenajn prelegojn:

- Enkonduko de Sara  
Spanò: [vk.retevent.com/prelegoj/SJujcqc8a4ktlotVdcQf](http://vk.retevent.com/prelegoj/SJujcqc8a4ktlotVdcQf)
- Prelego de Rakoen Maertens pri reprezentado de UEA kaj TEJO ĉe UN: [vk.retevent.com/prelegoj/77BPdnEsKskGvGgu8dG](http://vk.retevent.com/prelegoj/77BPdnEsKskGvGgu8dG)
- Enkondukaj prezentoj pri la tri "kolonoj" de UN:

o Mark Fettes pri evoluigo: [vk.retevent.com/prelegoj/S9EOEcvaQqa9xEeKmYWK](http://vk.retevent.com/prelegoj/S9EOEcvaQqa9xEeKmYWK)

o Ulrich Brandenburg pri paco: [vk.retevent.com/prelegoj/d184a2G3ae631sJL8WgE](http://vk.retevent.com/prelegoj/d184a2G3ae631sJL8WgE)

o Intervjuo kun Giuliano Turone pri homaj rajtoj: [vk.retevent.com/prelegoj/Bwidup4HNDBnCQwxkIiu](http://vk.retevent.com/prelegoj/Bwidup4HNDBnCQwxkIiu)

- Diskuto pri evoluigo kaj homaj rajtoj: [vk.retevent.com/prelegoj/PTpbfvYpuoZhCP6lj5s7](http://vk.retevent.com/prelegoj/PTpbfvYpuoZhCP6lj5s7)
- Diskuto pri la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo: [vk.retevent.com/prelegoj/osNlbDmsPmyKNnDLELxz](http://vk.retevent.com/prelegoj/osNlbDmsPmyKNnDLELxz)

Vi ankoraŭ povas aliĝi al la VK per [vk.mondafest.net](http://vk.mondafest.net) por spekti la prelegojn.

## VIRTUALA KONGRESO 2

Ĉu vi ŝatus vidi/revidi programerojn de la Virtuala Kongreso (VK), kiuj malaperos fine de aŭgusto? Okazos retrospekto pri la VK en la venonta kunveno, mardon 18/8 18:30-20:00. Por konektiĝi utiligu janan adreson: <https://huji.zoom.us/j/7508982919>.

Ni kundividis certajn specialajn programerojn, aparte specimenojn de la ses koncertoj kaj de la ok virtualaj ekskursoj. Pri la ekskursoj vi povas legi en la Festivala Kuriero (<https://mondafest.net/img/kuriero/kuriero8.pdf>). Ni ankaŭ ŝatus rakontojn de membroj kaj gastoj pri ties preferata kongresa programero.

Por kiu ŝatus mem provi: se vi aliĝis al la VK povas eniri la kongresan paĝaron per via pasvorto en <https://vk.retevent.com/ensaluti>, sekve iru al la plena programo (rekta ligilo: <https://vk.retevent.com/programo>).

Por trovi certan programeron laŭ ĝia nomo eblas uzi la serĉilon en la supra maldekstra angulo. Ekzemple, por vidi ĉiujn koncertojn oni tajpu en la skatolo "koncerto": aperos la listo de koncertoj. Aŭ, per rekta ligilo <https://vk.retevent.com/programo?s=koncerto>.

Se vi volas vidi la ekskurson en Jerusalemo, simple serĉu "Jerusalemo", <https://vk.retevent.com/programo?s=Jerusalemo>.

Se vi ne havas pasvorton aŭ ne sukcesas mem sekvi la instrukciojn, simple venu al nia kunveno marde.

## ELEKTO-KOMISIONO DE UEA

La komitato de UEA, dum Zoom-laborkunsidoj post la virtuala kongreso, elektis la novan elekto-komisionon por la periodo 2020-2023. Ĝi konsistas el Guy Matte, Kanado, kunordiganto; Michela Lipari, Italio, Hans Becklin, Usono kaj Mark Konijnenberg, Nederlando.

## EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON!



Tiu ĉi estas interesa, ĉar la eraro estas legebla plurnivele: la angla teksto devintus esti "Save water, drink champagne" (ŝparu akvon, drinku ĉampanon). Sed ankaŭ "safe" (sekura) iel taŭgas: akvo estas sekura, sed prefere drinku ĉampanon. Bonveniga trinkaĵo (anstataŭ drinkaĵo) en Aŭstria hotelo.

### PILLOLE DI SALVEZZA 1056: IL MURO DI BERLINO

In genere si ricorda il giorno in cui, il 9 novembre 1989, avvenne la cosiddetta "caduta del Muro di Berlino" (che, in un primo tempo, fu una "caduta" metaforica, perché ovviamente il muro non fu subito demolito, ma si permise il libero transito).

Invece, si ricorda poco il 13 agosto 1961, quando il Governo della "Deutsche Demokratische Republik – DDR" (Repubblica Democratica Tedesca) iniziò la costruzione di quello che definì "Antifaschistischer Schutzwall" (Barriera di protezione antifascista): una barriera che per 28 anni divise due mondi nel cuore d'Europa. [it.wikipedia.org/wiki/Muro di Berlino](https://it.wikipedia.org/wiki/Muro_di_Berlino)



Trascriviamo, con traduzione in italiano, un articolo mandato in onda il 28 agosto 1982 dalla Radiotelevisione Italia-RAI (Radio Roma), nel quadro delle trasmissioni per l'estero in lingua Esperanto.

Nessuno, nel 1982, avrebbe previsto il successivo evolversi dei fatti.

Alleghiamo un francobollo del 1986 della DDR, per il 25° anniversario del muro.

<p><b>PLILONGIĜAS LA MURO DE BERLINO</b></p> <p><i>Teksto de De Turrís, traduko de Antonio De Salvo</i></p> <p><i>Radio Roma – Esperanto, 28.8.1982</i></p> <p>La “Muro de Berlino”, tuŝebla esprimo de la simbola “ferkurteno” inter Oriento kaj Okcidento, ĵus plenumis 21 jarojn: ĝia konstruado, ja, komenciĝis la 13-an de aŭgusto 1961.</p> <p>En sia definitiva versio, ĉi tiu “ĉefverko de karcera inĝenierarto” mezuras, hodiaŭ, 107 kilometrojn, kaj estas alta 4,20 metrojn: antaŭ ĝi sternaĝas “nenies tereno” larĝa 30 metrojn, regata de 256 gardoturoj, 136 bunkroj kaj 256 hundegoj, ligitaj al la muro per ĉenoj, kiuj ebligas ilian moviĝon laŭlonge de la muro mem.</p> <p>De kiam la muro konstruiĝis, ĉe ĝi oni pafis almenaŭ 1.600 fojojn, estis 3.100 klopodoj forfuĝi, 71 homoj mortis kaj 112 vundiĝis; tio laŭ la oficialaj donitaĵoj.</p> <p>Nun, la “Muro de Berlino” estas iĝanta la “Muro de Germanio”: ĝuste antaŭ kelkaj semajnoj komenciĝis la laboroj por ĝin plilongigi, norden kaj suden, en totala longeco de 1.395 kilometroj. Iu vera “limomuro”, kiu eĉ pli tuŝebla</p>	<p><b>De Turrís: SI PROLUNGA IL MURO DI BERLINO</b></p> <p>Radio Roma – Esperanto, 28.8.1982</p> <p>Il “Muro di Berlino”, espressione tangibile della simbolica “cortina di ferro” tra Oriente e Occidente, ha appena compiuto 21 anni: la sua costruzione, infatti, cominciò il 13 agosto 1961.</p> <p>Nella sua versione definitiva, questo “capolavoro di ingegneria carceraria” misura, oggi, 107 chilometri, ed è alto 4 metri e 20: davanti ad esso si estende una “terra di nessuno” larga 30 metri, gestita da 256 torri di guardia, 136 bunker e 256 grossi cani, legati al muro da catene, che consentono loro di muoversi lungo il muro stesso.</p> <p>Da quando il muro è stato costruito, ci si è sparato almeno 1.600 volte, ci sono stati 3.100 tentativi di fuga, 71 persone sono morte e 112 sono rimaste ferite, secondo i dati ufficiali.</p> <p>Adesso, il “Muro di Berlino” sta diventando il “Muro della Germania”: proprio qualche settimana fa sono iniziati i lavori per prolungarlo, verso nord e verso sud, con una lunghezza totale di 1.395 chilometri. Un vero e proprio “muro di confine”, che dividerà</p>
-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

disigos du mondojn, du vivaranĝojn,  
du pensmanierojn.

in modo ancor piŭ tangibile due  
mondi, due stili di vita, due mentalità.

